



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Ankaŭ en la sezono

de la "verdaĵ" Eldonanto/Herausgeber

kukumoj* necesas Ludwig Pickel

informado ! Postfach 2113

Subtenu la D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 26/1976 - 28 junio 1976
Aperas ĉiusemajne

informadon de Pilo-Press!

Pri aktualaj problemoj

Romo (pp) - Pola aŭskultanto de Radio Roma demandis pri la stato de kelkaj aktualaj problemoj. Jen la demandoj:

"Jam de kelkaj semajnoj (ne laŭvicaĵ) mi ne povas kapti kontentige viajn elsendojn. Bedaŭrinde. Mi speciale nun ŝatus aŭdi vin, por scii vian opinion pri la nuna registara krizo, kaj pri la novaj balotoj, kiuj eble denove neniigos la klopodojn pri la leĝo por instruado de Esperanto. Ĉu la afero ankoraŭ havas ŝancon? Kiel status la klopodoj pri la socialista konferenco en Romo? Informadu pri tiuj temoj, ili ĉiam interesas la publikon!"

Jen la respondo de la Esperanto-Redakcio de Radio Roma kadre de la leterkesto:

"Ni bedaŭras, ke niaj aŭskultokondiĉoj ne estas bonaj, kaj esperas, ke tamen niaj geamikoj daŭre klopodos kapti nin, kun pli bonaj rezultoj.

Sekve de la anticipa fino de la parlamenta periodo, denove senvalidiĝis la leĝprojekto por instruado de Esperanto en la italaj lernejoj, ĉar ĉiuj leĝprojektoj, kiuj ne fariĝis leĝoj, aŭtomate senvalidiĝas ankaŭ kiel nuraj projektoj, kaj oni devas rekomenci la vojon ekde la unuaj paŝoj.

Pro la politika krizo en Italujo, kiu jam datumas de longa tempo, oni ankaŭ devis provizore interrompi la preparojn por la planita Konferenco en Romo de Socialistaj Esperantistoj, des pli ke, ankaŭ sur internacia ebena, la reagoj de la socialistaj partioj ne estis tiel fervoraj kiel oni esperis, precipe ĉar mankis sufiĉa informagado flanke de la esperantistoj." (Laŭ Radio Roma)

Lingvaj malfacilaĵoj en la Eŭropa Parlamento

Strasburgo (pp) - La Komisararo de Eŭropa Ekonomia Komunajo, Borschette, respondante al demando de la brita konservativa deputito Reay, lastatempe certigis, ke la membroj kaj la funkciuloj de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo daŭre povos pritrakti oficialajn aferojn en sia propra lingvo, kaj ke oni daŭrigos la tradukadon de leĝoj en ĉiujn lingvojn de Eŭropa Ekonomia Komunajo.

Tom Normanton, alia brita konservativa deputito, tiam atentigis pri la kosto de tia proceduro (po unu el kvar funkciuloj de Eŭropa Ekonomia Komunajo laboras en lingvaj servoj), kaj sugestis, ke la internacia lingvo Esperanto eble estus pli bona kaj malpli multekosta solvo. (Laŭ Radio Roma)

Kongreso en Sudafriko?

Kapurbo (pp) - Laŭ la gazeto "Bona Espero" 4/1975, ŝajnas, ke sufiĉe granda nombro da sudafrikaj esperantistoj favoras la ideon okazigi, dum la kuranta jaro 1976, la unuan Esperanto-kongreson de Sudafriko.

Pilo-Press, internacia informservo ĉiusemajna, jarabono 30,-- GM
ekabono daŭre eblas. Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,
PSchK Nürnberg 819 56-851

Ambasadoraj gratuloj

Novjorko (pp) - En letero al la Prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio, la aŭstralia ambasadoro de la Unuiĝintaj Nacioj, Ralph L. Harry, gratulas pro la ĵus aperinta broŝuro "Esperanto, Internacia Lingvo de Amikeco" okaze de la Olimpikaj Ludoj en Montrealo. Laŭ opinio de Ralph L. Harry la broŝuro "estas multe pli bona ol la modesta broŝuro, kiun ni eldonis en Munkeno."

Ambasadoro Ralph L. Harry ankaŭ pretigis la germanan tradukon por la vortaro kaj frazaro.

De la 22-a ĝis la 24-a de julio la aŭstralia ambasadoro estos en Montrealo, por rigardi la remadon. Li estos preta partopreni en esperantista kunveno okaze de la Olimpikaj Ludoj.

Turisma vortaro Pola - Esperanta

Bydgoszcz (pp) - La Klubo de Gazetaro kaj Libro "Esperanto" en Bydgoszcz eldonis Vortareton Polan-Esperantan. Sur la 40 paĝoj la aŭtoroj Regina Grzebowska kaj Andrzej Grzebowski kolektis ĉ. 4.000 vortojn, la plej uzatajn en turismaj Esperanto-kontaktoj. Sur la kovrilpaĝo troviĝas ankaŭ tabelo de 45 prefiksoj kaj sufiksoj.

La vortareto estis eldonita okaze de Internacia Esperanto-Renkontiĝo - "Bydgoszcz-76". Ĝi estas ĉefe destinita por du mil partoprenantoj de internaciaj Esperanto-arangoj de Burao de Eksterlanda Turismo por Junularo "JUVENTUR" kaj Turisma Centro de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz dum la jaro 1976.

Interesuloj povas ricevi la vortareton sendante tri respondkuponojn al: KLUBO "ESPERANTO", str. M. Curie-Skłodowskiej 10/4, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando.

Migrado en Svisa Alparo

Corcelles, Svisl. (pp) - Svisa Esperanto-Junularo informas:

Ĉu vi ŝatus koni la sovaĝajn belecojn de montoj kaj valo, marŝante en agrabla esperantlingva grupo? Tiam tuj informiĝu pri la tria somera migrado, ĉijare okazanta en Grizono de la 30-a de julio ĝis la 4-a de aŭg.76. Partoprena kotizo: ekde 180,- svisaj frankoj por tuta migrado inkludante mangojn, veturadojn, loĝadon; ankaŭ partotempa partopreno eblas.

Por pliaj informoj skribu al: Svisa Esperanto-Junularo, Rue de la Cure 5 CH-2035 Corcelles, Svislando.

Sudokcident-Germana Esperanto-Tago

Mannheim (pp) - La Estraro de SOGEO kaj la Esperanto-Amikoj Mannheim-Ludwigshafen invitas al la Sudokcident-Germana Esperanto-Tago 1976, okazanta la 11-an kaj 12-an de septembro 1976 en la naturamika domo Kohlhof proksime de Altenbach kaj Wilhelmsfeld en la mezalta montaro Odenwald.

El la programo:

Sabate: Laborkunsido pri aktualaj demandoj de la Esperanto-movado; komuna vespermanĝo; Internacia vespero kun distra programo.

Dimanĉe: Esperanta literaturo: Kálmán Kalocsay kaj lia verkaro, prelego de R. Hauptenthal, membro de la Akademio de Esperanto; Lingva ekzerco: Enigmo-konkurso kun libropremioj; Komuna tagmanĝo; amika kunestado kaj vin-gustumo.

Okazos librostando kaj informa ekspozicio por la ne-esperantistaj gastoj en Kohlhof.

(Daŭrigo sur p. 3!)

La aliĝkoto estas 6,-- GM. Informojn donas: Johannes Radam, Osterroder Weg 4, D-6800 Mannheim 33

44-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

Stubenberg (Aŭstrio) (pp) - De la 24-a ĝis la 31-a de julio 1976 okazos la 44-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en la aŭstria loko Stubenberg.

El la programo: Membrokunveno de la Internacia Ligo de Blindaj Esperantistoj; prelegoj i.a. pri blindul-politika temo de Josef Smietanko, Pollando, kaj pri la aŭstria birdaro de Edeltraut Kammerhofer, Aŭstrio; ekskurso, distraĵoj, lingvokurso.

Distingo al Esperanto-societo

Sofio (pp) - La Ŝtata Soveto de Bulgario distingis la 31-an de majo per ordeno "Kiril i Metodi" - dua grado -, la lokan Esperanto-societon "Lumo" en Veliko-Tarnovo lige kun ĝia 80-jariĝo kaj pro "ĝia multjara populutila agado".

Tiu ĉi distingo ne estas izolita okazo. En la lastaj jaroj per la sama ordeno estis distingitaj la Esperanto-societoj den Plovdiv kaj Ŝumen, la Bulgara Esperantista Asocio mem, la asocia organo "Bulgara Esperantisto" kaj apartaj meritoplenaj esperantistoj.

Esperanto en la elementa lernejo

Hannover (pp) - Laŭ la informilo "Esperanto en lernejo kaj universitato" de AGEI-sekcio Malsupra Saksujo, la eksperimento internacia "Esperanto en la elementa lernejo" bone funkcias. (Pri la eksperimento Pilo-Press jam raportis siatempe).

Nur la grekaj gelernantoj havas kelkajn malfacilaĵojn, pro la tro granda nombro da infanoj en unu klaso (45!!), pro la alia alfabeto kaj aliaj kaŭzoj. La infanoj nun baldaŭ finos la unuan libron, Laborilo I de Korta (Sub la Verda Standardo).

La kulturministerio de Niedersachsen (Malsupra Saksujo), FRG, estas impresita pri la bonaj rezultoj de la unua testo, kaj nun disponigis por la 1-a lernojaro 1000 GM.

La problemo de slovena minoritato

Vieno (pp) - La semajnfina komentario de d-ro Alfred Macher en la Esperanto-elsendo de Radio Vieno denove sin okupis pri la slovena minoritato en Suda Karintio. La komentario tekstas:

"En Aŭstrio estas kutimo, ke la registaro, antaŭ ĉiu vere grava politika decido, pridiskutas ĝin kun la opoziciestroj, alcelante ties konsenton. Tio okazas ankaŭ nun, ĉe la solvo de la tiel nomata problemo de la slovena minoritato en Suda Karintio.

Tiu slovena minoritato postulas, pli kaj pli akre, plenumon de la lastrestinta el la promesoj donitaj al ĝi en paragrafo sep de la ŝtatkontrakto, nome starigon de du-lingvaj vojmontriloj. Grandparto de la karintia majoritato kontraŭbatalas la du-lingvajn vojmontrilojn, timante ke surbaze de tiaj Jugoslavio povus ree pretendi cedon de karintiaj teritorioj.

Ĉiuj tri parlamentaj partioj ĵus konsentis unuanime al leĝopropono pri minoritat-nombrado kiel bazo por reguligo de ĉiuj koncernaj aferoj. Sed la reprezentantoj de la slovena minoritato opozicias, asertante ke multaj slovenoj ne kurageas konfesi sin slovenlingvaj.

Kia troigo! Demokrata Aŭstrio certe ne persekutos iun ajn pro lia aŭ ŝia gepatra lingvo. Tia aserto nur plistreĉas, nenecese, la reciprokajn malfidon.

Slovena minoritato..(Daŭrigo)

La karintiaj slovenoj ĝuas absolutan egalrajtecon kun ĉiu alia aŭstra ŝtatano. Mankas al multaj el ili nur la homa komprenemo flanke de parto de la karintia majoritato.

Sed homajn interrilatojn oni ne povas plibonigi sole per leĝaj paraĝrafoj. Bezonigis do, tiucele, ankoraŭ multa penado! "

Esperanto en la Radio

Vieno. La bela voĉo de s-ino Charlotte Hube, edzino de la direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo, denove ravis la aŭskultantojn de la Esperanto-elsendoj. Ŝi kantis, kiel ni antaŭanoncis, unu el la plej popularaj melodioj de Robert Stolz "Lastaj rozoj floras ĉe l' erikoj". Estis vere granda ĝuo, des pli ke la aŭdeblecoj estis sufiĉe bonaj, tiel ke mi eĉ povis surbendigi la kanton. Akompanis profesoro Elisabeth Pohl, la Esperanto-tradukon prizorgis Hugo Kraus. La kanto estis kantita je la fino de memoriga felietono pri Robert Stolz oake de lia unua mortotago. - La elsendo en la regiona programo de la 22-a de junio sur meza ondo 203 m temis pri Frieda Feichtinger, la nestorino de la aŭstraj esperantistoj, kiu mortis la 14-an de majo 1976. Kiel ni eksciis, estonte tiu ĉiumonata elsendo estos disradiata sur ultra-kurtondo de la sendilo Kahlenberg.

Zagrebo. Kun intereso mi aŭskultis al la Zagreba elsendo, la lasta de la monato junio, pro la superrigardo de ricevitaj periodaĵoj kaj respondoj al korespondantoj. Tiu preparolo de Esperanto-periodaĵoj donas ĉiam bonan superrigardon pri la aktualeco de la Esperanto-gazetaro resp. pri la malaktualeco. Elstaras la ofte trafaj komentoj! La venonta elsendo disaĝdigos krom la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio raportaĵojn pri la IFEF-kongreso en Skelleftea!

Berno. En kelkaj Esperanto-elsendoj momente furoras G. Silber, ĉefredaktoro de Kontakto kaj Literatura Foiro. Dum la pasintaj du elsendoj s-ro Gacond intvjuis lin pri tiaj du revuoj, estis parte rimarkindaj eldiroj kaj konstatoj. - D-ro A. Baur ĉi-foje parolis pri specialigita ekspozicio, nome la "Bestoj kaj ni", sur la tereno de la Svisa Specimena Foiro en Basel. La ekspozicio volas helpi por korekti la rilatojn inter homoj kaj bestoj.

Pekino daŭre elsendas en Esperanto vendrede kaj sabate kaj estas en ĉi tiu regiono sufiĉe bone aŭskultebla.

Varsovio. En la centro de mia intereso ĉi-foje estis la informoj kaj komentoj koncerne la okazaĵojnen Pollando en rilato kun la ŝanĝo de la prezostukturo de nutraĵaj prezoj. Unue oni povis aŭdi la informojn pri la registara propono en la pola parlamento kaj la koncernankomenton pri la neceso de tiaj prezaltigoj. Poste oni povis sekvi la Esperantan version de la parolado de ĉefministro Jaroszewic pri la repreno de la prezaltiga propono kaj fine ankaŭ informojn pri perturboj, kaj mitingoj de laborhomoj. Aŭskultanto de la Esperanto-elsendoj do havis la eblecon kompari la oficialajn polajn informojn kaj komentojn kun la raporto en la gazetaro, radio kaj televido en la propra lando. - Postsonis ankaŭ ankoraŭ komentoj kaj informoj pri la Gierrek-vizito en FRG. - Laŭ la Esperanto-ekspreso aperis nun en Sovetunio la libro pri interlingvistiko, pri kiu PP siateme jam raportis. - La Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo ĉi-foje dissendis informojn el Pilo-Press n-ro 24/76 pri la nova lernolibro "Praktiku kun ni Esperanton" el Bonn kaj la baldaŭ aperonta libro "Mia amata Esperanto" de R. Schulz

Japana neceso: "Por mi granda surprizo estis, ke ni devis iri en la arbaron kaj serĉi la plej taŝgan lokon por necesi." El n-ro 3/76 de "La revuo orienta".